



**Universala  
Esperanto-  
Asocio**



**AKTIVULA  
MATURIGO**

**Estrara Subteamo: MOVADO**

Al: Landaj Asocioj de UEA (aliĝintaj kaj ne)

Poste al: Fakaj Asocioj, la Komitato, Konsilianoj, ILEI, TEJO, listoj kaj unuopuloj

## **AMO en la mondo**

La nova Strategia Plano de UEA klare vidas la bezonon por pli da trejnitaj aktivuloj por realigi la progreson sur niaj kerne gravaj kampoj – konigi pli vaste kaj moderne la oferton de Esperanto kaj pli alloge kaj moderne instrui ĝin. UEA devas preni gvidan rolon en tio, sed ĉefe por kunordigi la kontribuojn de landaj agantoj. Jen la unuaj konkretaj signoj, ke ni eklaboris realigi la Planon.

La tasko evoluigi la Aktivulan Maturigon falis al la estrara subteamo ‘Movado’. Feliĉe TEJO jam de kelkaj jaroj realigas serion da aranĝoj por trejni siajn aktivulojn, kaj ilia sperto ege helpas al ni. Tri jam eldonitaj dokumentoj skizas la principojn de Aktivula Maturigo (AMO) kaj la seminarioj pri AMO (SPAMO). Jen konkretaj planoj por la komenco de 2014, kun indikoj pri imagoj ĝis la fino de tiu jaro.



### **AMO-seminario 1**

**Loko:** Horány, Hungario (40 km. de Budapeŝto, sur insulo en la Danubo)

**Datoj:** 21-24 marto (vendrede ĝis lunde)

**Temo:** Kiel komuniki efike.

**Gvidantoj (konfirmotaj):** Stefan MacGill (Kiel labori internacie), Veronkia Poór (Kiel prizorgi lokan grupon), Lu Wunsch van Rolshoven (kiel pretigi gazetarajn komunikojn kaj rilati kun ĵurnalistoj), kaj reprezentanto de E@I (komunikaj ebloj en komputika mondo).

**Ligita aranĝo:** Junulara Esperanto- Renkontiĝo (JER) organizata samloke de la hungara sekcio de TEJO (HEJ) inter la 21a kaj 23a de marto. La semina programo fariĝos integra parto de la JER-programo. Informoj: [www.jer.hu](http://www.jer.hu)

### **AMO-seminario 2**

**Loko:** Viktorio, Kanado (100 km. de Vankuvero, sur insulo en la Pacifika Oceano)

**Datoj:** 10-11 julio (ĵaŭde-vendrede)

**Temo:** Strategio kaj praktiko de Esperanto-informado en Norda Ameriko

**Gvidantoj planataj:** Mark Fettes, Orlando Raola, Humphrey Tonkin

**Ligitaj aranĝoj:** Nord-Amerika Somera Kursaro (NASK), finiĝonta en la 7an de julio, poste la 62a-Landa Kongreso de Esperanto-USA (jul 11-14).

Informoj: [www.esperanto-usa.org](http://www.esperanto-usa.org).



### AMO-seminario 3 - (poste renumerita 4)

**Loko:** Siano (X'ian), Ĉinio.

**Datoj:** 16-23 aŭgusto (inter du sabatoj)

**Temo:** Konsciigo, Kapabligo kaj Praktiko por nia lingvo Esperanto.

**Gvidantoj planataj:** Ĉielismo Wang, Trezoro Huang Yinbao, Miaohui, Stalino Yuan

**Ligita aranĝo:** 4-semajna Somera Esperanto-Lernejo, kiu finiĝos en la 23 aŭgusto. Informoj: [www.esperanto.cn/amo](http://www.esperanto.cn/amo)



Kadre de la 81a Itala Kongreso apud Trento (aŭg 23-30), okazos seminario de aktivula trejnado; restas decidi, ĉu tio eniros formale la serion de SPAMO. Deziro por trejnseminario en Afriko ekzistas; kadre de la 5a Afrika Kongreso jarfine okazos diskutoj kaj planado por seminario, antaŭvideble en la lastaj monatoj de 2014. Detaloj por ĉiuj seminarioj pri aliĝado, aliĝkondiĉoj, kotizoj kaj programoj legeblas rete, ĉe la indikitaj adresoj kaj ĉe la retejo de UEA.

Resume, jen kiel UEA planas arigi spertulojn pri projektoj kaj kampoj por ni ege gravaj kaj doni al ili eblon transdoni sian sperton al novuloj, kaj stimuli la interŝanĝadon de spertoj, en kiel eble plej multaj mondpartoj.

## PER AMO AL PLI KAPABLA MOVADO!

